

Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo

ĵaŭdon la 24-an de septembro 2020 per Skype

(aprobata en la interkonsiliĝo la 22-an de oktobro 2020)

Ĉeestis

Claude Rouget, Amelie Matt kaj Mario Machlik (Tromsø)

Herman Ranes kaj Jardar Eggesbø Abrahamsen (Trondheim)

Bård Hekland (Bergen)

Antaŭanoncis nepartoprenon Lars Sandbakk

0. Tagordo

La tagordo estis aprobata.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 20-an de aŭgusto

La protokolo estis dissendita la 21-an de septembro. La protokolo senŝanĝe aprobiĝis.

2. Ekonomio

a) Ĉu ni bezonas budĝeton?

Claude estis antaŭe proponinta, ke ni bezonas budĝeton kiel gvidilon por nia agado. Ni diskutis la aferon. Dum kiam la nuna estraranoj membras en la estraro, neniam estis budĝeto. Niaj kostoj estas sufiĉe konstantaj, kaj plejparte ligiĝas al eldonado de NE-isto kaj la oficejo. Se ni faru budĝeton, ankaŭ ekestas demando, ĉu ĝin traktu la Landa Kunveno aŭ la estraro. **Decido:** Ni ne bezonas ĝeneralan budĝeton. Sed se proponiĝos pli ampleksaj projektoj, nepras havi apartajn budĝetojn por tiuj. Ĉefe mankas ne mono, sed tiuspecaj iniciatoj.

b) Vipps

Claude havigis Vipps-konton al NEL. Fakte jam estis registrita tia konto, je la nomo de Anne Karin, sed nun la administraj rajtoj estas transigitaj al Claude. Ni dume registris du numerojn, 619938 por ĝeneralaj pagoj kaj 621164 por membrokotizoj. Ni pagos 1,75% makleraĵon. **Decido:** La estraro proponas ke ankaŭ Douglas havu aliron al la Vipps-konto. Claude kontaktos Douglas pri tio.

Ne estis aliaj priekonomiaj ĝisdatigoj.

3. Jarraporto 2019

Estas aldonitaj la mankantaj informoj de NJE kaj la fina resumo. **Decido:** La estraro aprobas la jarraporton kaj plusendos ĝin al Douglas por aperigo en NE-isto nr. 5.

4. Seminario 2020

Mario kontaktis Stefan MacGill, Peter Wraae kaj Ann-Louise Åkerlund. Ŝajnas, ke ĉiuj pretas partopreni, sed ili volas havi iom pli da informoj.

Ann-Louise demandis, ĉu ni volas nur unu reprezentanton de Svedujo, aŭ ĉu ni volas malfermi la seminarion ankaŭ al aliaj? **Decido:** NEL bonvenigos ankaŭ membrojn de DEA kaj SEF al la seminario. La elektita dato estos la 21-a de novembro. Ni komencu je la 14-a aŭ 15-a, depende de la daŭro de la fina programo. La seminario okazu per Zoom, Bård tion organizos. Kiel provon, ni okazigos nian venontan estrarkunsidon per Zoom. Mario plutenos kontaktojn kun la prelegantoj.

5. Membroj nepagintoj

Bård dissendis leteron al 26 nepagintoj. Reagis el ili sep per pago de la mankanta kotizo, kvar al la NEL-konto kaj tri per Vipps. Kelkaj reagis ankaŭ per mesaĝo, ke ili eksigās de la asocio.

La ceterajn, ni bedaŭrinde devas konsideri perditaj. **Decido:** Venontjare ni metu ruĝajn krucojn en NE-isto de la unua numero kaj dissendos leteron pli poste dum la printempo.

6. Nova broŝuro, aŭ kiel ni informu?

Ni diskutis, ĉu ni bezonas paperan broŝuron kaj se jes, kiuspecan. **Decido:** Ni bezonas iun mallongan broŝuron, kiun eblas elprinti laŭbezone. Eblas ankaŭ havi pli ampleksan, sed ne same gravas. Estus bone traduki iun bonan jam faritan broŝuron de NEL aŭ iuj aliaj. Bård esploros la alternativojn kaj raportos en la sekva kunveno.

7. Vortara laboro

Herman kontaktis Jørgen Bosoni, li eĉ ne havis tempon respondi ĝis la venonta semajno. Herman kaj Jardar pensas, ke granda parto de la vortokolektado kaj kontrolo estas farita, sed ni ne scias, kiom da materialoj estas enmetitaj en la datumbazon. La estraro taksas grava la retan publikigon de nova vortaro. **Decido:** Herman raportos en la sekva kunsido.

8. Nordiaj esperanto-gazetoj

Venis propono de la sveda landa organizo SEF interŝanĝi rete niajn gazetoj al la estrararoj, eble ankaŭ al aliaj membroj. **Decido:** Ni proponas, ke niaj revuoj estu rete legeblaj de membroj en la najbarlandaj asocioj kiel aldona membroservo. Mario respondos al Douglas kaj Ann-Louise Åkerlund.

9. Eventualaĵoj

a) Operasjon Dagsverk

Claude ricevis pozitivan reagon de Operasjon Dagsverk en Tromsø. La klubo dungos kvar gejunulojn la 29an de oktobro. La estraro aplaŭdas la iniciato kaj antaŭĝojas aŭdi pri la rezultoj.

b) Aersekigilo

Estas aĉetita nova aersekigilo en Esperantonia. Ĝi kostis 999 kronojn. **Decido:** NEL pagu la tutan sumon. Claude kontaktos Douglas pri repagoj.

c) NRK-programo

Lars retroŝte informis, ke li, kun Heroo el Koreujo, estis intervjuita de NRK la 2-an de septembro. La ĵurnalisto sekvis ilin dum promeno al loka monteto kaj promesis minimume 3-4 minutan regionan elsendon. Sed la intervjuo ankoraŭ ne estas dissendita.

La interkonsiliĝo daŭris de 20:30 ĝis 22:00

La venonta interkonsiliĝo okazos jaŭde la 22-an de oktobro je 20:30

Protokolis Bård Hekland